MARTINUS INSTITUT

N-ro 2 - 2018

# Kosmos

## LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

**Simbolklarigo:**
La viva estulo 1


**Martinus:**
Du vivelementoj

**Martinus:**
Kiel oni lernas antaŭmalhelpi elreviĝojn

**Ole Therkelsen:**
Martinus kaj Kriŝnamurti 2

**Martinus:**
Kiu estas mia proksimulo?

**Martinus:**
Simbolo n-ro 7:
La principo de vivunuoj aŭ la unua videto de la ekzisto de Dio



© Martinus Institut 1981 Reg. 6

*La viva estulo 1*

Esperanto

# Resumo de klarigo pri simbolo n-ro 6
# La viva estulo 1

La viva estulo estas eterna principo: "mio" – la kreanto, "kreokapablo" kaj "la kreaĵoj". Por la tri elementoj en ĉi tiu principo uzis Martinus la nociojn X1, X2 kaj X3. Laŭ kerna analizo la estulo estas eterna, senmorta "io kio estas". Ĉi tiu kerna analizo tamen estas absolute nealirebla por rekta fizika sensado. Tio kio rekte estas sensebla de la estulo, estas nur tio, kio estas kreita. Kaj ĉio kreita estas pereema. La viva io en la estulo, estas neskueble la mio kaj ĝia eterna aŭ kosma vivstrukturo. "La morta" aŭ pereema io estas ĝia fizika korpo kaj ceteraj strukturoj, kiuj nur estas kreitaj realaĵoj.

Centraj detaloj en la simbolo:

- La plej supra blanka kampo simbolas la mion aŭ X1 de la viva estulo.
- La meza kampo simbolas la kreokapablon aŭ X2 de la mio.
- La plej malsupra kampo simbolas la kreitan ion aŭ X3.
- La violkoloro esprimas la plej altan energion de la vivo, la patrina energio. En ĉi tiu energio ĉiuj ĉeffunkcioj de la vivo estas enradikiĝintaj.
- La rondaj koloritaj kampoj simbolas la bazajn talentokernojn aŭ "spiralcentrojn" de la mio.
- La ses koloritaj kampoj simbolas la kreitajn korpojn:
  ruĝa – la instinktokorpo
  oranĝkolora – pezokorpo
  flava – la sentokorpo
  verda – inteligentokorpo
  blua – intuiciokorpo
  indiga – memorkorpo

Ĉi tiuj korpoj konsistigas la konscion de la estulo, per kiuj ĝia kreado kaj spertado de la vivo troviĝas. Pro tio ke la vivspertado estas eterna procezo de ŝanĝiĝo aŭ kreado, ŝanĝiĝas ĉi tiuj bazenergikorpoj laŭ la ritmo de la sopiro kaj volo de la estulo. Per tio la daŭra evoluo estas konservata tra ses vivsferoj.


La oranĝkolora cirklo simbolas la fizikan korpon de la estulo. La radioj kaj la kruco esprimas la eternan spiritan strukturon.

Legu la plenan simbolklarigon de Martinus en *La Eterna Mondbildo 1*.



# Du vivelementoj

de Martinus


M2330

**1. Nuntempe la vivo sur la tero ebligas multajn formojn de sortoaktiviĝo**

Por ĉiu pensanta homo ne povas esti sensignife iomete halti kaj pripensi tion, kio troviĝas malantaŭ la nocio sorto. Ĉiutage la gazetoj informas pri akcidentoj kaj pli aŭ malpli krudaj okazaĵoj. Jen oni legas pri flugmaŝino kiu akcidentis, jen pri ŝipkatastrofo, akcidento sur fervojo aŭ en fabriko. Ofte la nervoj de homoj mem misfunkcias tiel, ke ili mortigas, aŭ mortigas sin mem. Kaj en nia tempo militoj, revolucioj kaj ribeloj estas aferoj pri kiuj oni povas legi en la gazetoj preskaŭ ĉiutage. Ie sur la tero okazas milito kie maŝinpafiloj, bomboj kaj grenadoj detruas ne nur soldatojn, sed ankaŭ civilulojn, maljunajn homojn, virinojn kaj infanojn. Ĉiu infano kiu naskiĝas sur ĉi tiu terglobo, naskiĝas al oceano da riskoj pri tio ke ĝia organismo estos difektita aŭ mortigita. Iuj estuloj estas persekutataj jam en la korpo de la patrino, ĉar fetomortigo apartenas al la modernaj aferoj, kiuj pli aŭ malpli laŭleĝe estas farataj kaj de kuracistoj kaj de nefakaj homoj. Iuj infanoj naskiĝas ĉe gepatroj kiuj ne havas multe da amo al siaj idoj, kaj aliaj naskiĝas ĉe homoj kiuj trans ĉiuj limoj tro dorlotas kaj tro adoras ilin, kio ja povas esti same malbona.

**2. Sorto ne estos nur io malhela kaj minaca, sed povas esti ankaŭ io hela kaj feliĉa**

Jam en la korpo de la patrino aŭ en la infana aĝo do estas eble, ke la tera homo ekhavas suferojn aŭ venas en malfeliĉajn situaciojn aŭ en ion, kio kvankam nuntempe ĝi estas agrabla, pli poste ĝi povos damaĝi. Estas tre kompreneble, ke per la vorto “sorto” la homoj ĝenerale komprenas ion malhelan aŭ minacan, dum kiam temas pri la helaj kaj ĝojigaj travivaĵoj ili ne tiom pensas pri la sorto. Sed ĉu estas la intenco de la vivo ke la teraj homoj estu persekutataj de kruda kaj amara sorto, kaj ke sekve ili ne povos travivi tiun pacon kaj ĝojon pri kiuj ili efektive sopiras? Ne, tiel ne estas. La intenco estas, ke la homoj sur la tero iom post iom travivos helajn kaj feliĉajn sortojn, ĉar la sorto povas absolute esti io hela kaj feliĉa. Sed por ili necesas lerni kiel eblas krei tian sorton.

**3. La sorto estas leĝoligita**

La sorto ne estas io blinda kaj hazarda. Ĝi estas leĝoligita, same kiel ĉio alia en la vivo kaj la naturo. Unu el la plej gravaj aferoj por la moderna homo estas lerni ion pri la leĝo pri sortoformado. La homo scias, ke troviĝas io kio nomiĝas naturleĝoj, sed ĝi inklinas opinii ke tiuj naturleĝoj validas por la naturo, sed ne por ĝia propra mondo. Ĝi forgesas ke ĝi mem estas parto de la naturo. Ĝi estas submetita al precize la samaj leĝoj kiel la mineraloj, la plantoj kaj la bestoj,

sed ĝi spertas la leĝojn alimaniere ol la menciitaj estuloj, ĉar ĝi havas pli alte evoluintan konscion. Tiu pli alta konscio tamen ne estas tiel alte evoluinta, ke en ĉiuj rilatoj la homoj aranĝas sian vivon laŭ tiuj leĝoj. Ili faras tion parte, kion montras la tuta moderna, teknika evoluo kiu estas bazita sur la fizika scienco. Tiu scienco estas ja precize instruado pri la rilato de la vivaj estuloj al la naturleĝoj. Tiu scienco montras al ni ke ĉie, kie la naturo realigis sian verkon, ni vidas nur geniecon aŭ la apogeon de perfekteco en ĝia kreoproceso. Ĉiu printempo donas novan diecan prezenton de perfekte logika kreado. La nova foliaro disvolviĝas kiel ero en logika plano, kaj el la malhela humo ĝermas herbo kaj greno, kaj abundo da riĉkoloraj floroj. Poste la rezulto de tio fariĝos semoj kaj fruktoj, kiuj servas al generado de la plantoj kaj ankaŭ al la nutraĵo por bestoj kaj homoj. De la naturo la homo lernis semi kaj rikolti, kaj ĝi scias, ke kiam ĝi semas avenon ĝi ne povas atendi rikolti hordeon aŭ tritikon. Sed tiu sama, tera homo, kiu levis sin super la realan bestoregnon kaj nuntempe subigas al si la teron, ankoraŭ ne scias ke la naturleĝoj regas ankaŭ en ĝia interna mondo, en ĝia pensmondo, kiu ankaŭ estas parto de la naturo. Ankaŭ tie validas ke oni rikoltos tion kion oni semis, kaj kvankam la homoj sopiras pri paco, feliĉo kaj harmonio, ili ne povos travivi tion antaŭ ol ili semos pacon, feliĉon kaj harmonion en la mondo kiu ĉirkaŭas ilin.

### 4. La teraj homoj ankoraŭ estas nematuraj kaj acidaj fruktoj sur la arbo de vivo

Ĉio kion kreas la naturo trairas plurajn stadiojn antaŭ ol ĝi atingos tiun staton kiu estas perfekta. Okazas proceso de maturiĝo kiu daŭras iom da tempo. La fruktoj necese trairas acidajn stadiojn antaŭ ol ili maturiĝas. La principoj, kiujn ni povas superrigardi en la plantoregno, ĝuste de la semo kiu ĝermas, la planto kiu kreskas, burĝonas, floras kaj faras fruktojn kun novaj semoj aŭ kernoj, estas universalaj principoj, kiuj validas ankaŭ por la kosmaj vivovojoj pri kiuj la tera homo ankoraŭ ne havas superrigardon. Tio validas ankaŭ por ĝia propra vivovojo, kiu ne komenciĝis ĉe la gravediĝo kaj la naskiĝo, kaj ne finiĝas per la morto. Sur la “arbo de vivo” la teraj homoj estas fruktoj ankoraŭ nematuraj kaj acidaj. Ili ankoraŭ ne estas perfektaj homoj, sed ili survojas por fariĝi perfektaj. La tuta evoluo de mineralo al homo, kiu okazis dum miliardoj da jaroj, estas proceso kiu daŭre okazas. La teraj homoj estas la fruktoj de tiu grandega evoluproceso aŭ kreado. Ili survojas por fariĝi tio, kio en la rakonto pri la kreado en La Malnova Testamento estas simbole esprimita kiel la “homo laŭ la bildo de Dio”. Tiu tuta fatala stato, kiun la teraj homoj nuntempe travivas, montras ke ili ankoraŭ ne estas finevoluintaj homoj, sed ankoraŭ estas nematuraj kaj nefinevoluintaj.

### 5. Unu mondo, paco kaj alproksimula amo estas la celo por la teraj homoj

Kia do estos la matura, homa stato? La teraj homoj jam havas ĝian komencon en siaj pensoj kaj sopiroj. Ili parolas pri “unu mondo”, pri internaciismo, paco kaj alproksimula amo. Ili ankaŭ havas en sia konscio dispoziciojn por tia vivdisvolvo, kvankam tio ankoraŭ pli estas kiel ebloj ol kiel io realigata. La kaplaboj kaj dispozicioj, kiuj en precipa grado disvolviĝas kiel estmaniero kaj per tio fariĝas sorto, estas dispozicioj por kolero, ekscitiĝo, amaro, malamo, egoismo kaj potencavido. Tiujn dispoziciojn praktikas la nacioj kiel ankaŭ la unuopaj individuoj, kaj tio okazas kaj kiel nacia egoismo kaj kiel persona

egoismo. Per tiuj kapabloj kaj dispozicioj oni semas amasojn da sarkaj semoj, kaj la homoj tamen kredas ke ili povas rikolti pacon. Ili iritiĝas pro la estmaniero de aliaj, ili ekscitiĝas kaj nomas tiun staton "sankta kolero" kaj "justa kolero", kaj ili fariĝas senesperaj kaj amaraj, ĉar aliaj homoj ne estas tiaj kiel ili deziras ilin. Ili sentas sin persekutataj de la sorto, ja ili eĉ sentas sin martiroj, kaj opinias ke ili meritas ion pli bonan.

**6. Kiel magneto la homo altiras ĝuste tiun sorton, kiu povas doni al ĝi la necesajn spertojn**

Ĝuste ĉi tie ni estas ĉe la kerno de la afero. Tio kion la homoj nun treege bezonas lerni kompreni, estas tio ke neniu estas martiro. Neniuj estas persekutataj, malamataj, mokataj aŭ alimaniere ekhavas malagrablan aŭ eble eĉ suferplenan sorton sen tio, ke ili mem estas la plej interna kaŭzo de tiuj okazaĵoj. Ĉiu homo estas kiel magneto altiranta precize tiujn okazaĵojn kaj kunestulojn kiuj povas doni al ĝi tiujn spertojn kaj travivaĵojn, kiujn tiutempe ĝi plej bezonas. Per siaj pensoj kaj agoj en la pasinteco ĝi semis ion, kaj nun ĝi necese rikoltas kion ĝi semis, por senti la efikojn kaj ekhavi la necesajn spertojn. Se tiu sortoformado rezultigas morton tio signifas, ke post la vivo en la spiritaj mondoj la koncernulo envenas en novan, fizikan enkarniĝon kun tiuj spertoj kiel riĉaĵo en sia konscio, ne kiel tagkonscia memoro, sed kiel fantazio pri danĝero, konscienco aŭ pli granda kunsentokapablo por homoj kiuj estas en malfacilaĵoj. Kial troviĝas homoj, kiuj en precipa grado sentas kiel taskon helpi malsanajn kaj suferantajn kunhomojn? La kaŭzo estas, ke vidante la doloron de aliaj ili sentas ĝin kvazaŭ doloron en sia propra korpo. Tia kapablo de enviviĝo kaj kunsento povas evolui nur per tio, ke la homoj mem trairis malagrablojn kaj suferojn, kaj havas la spertojn de tiuj konservitaj en talentokerno en sia superkonscio. Neniuj el la suferoj aŭ malagrabloj, kiujn la homoj spertas, estas hazardaj aŭ vanaj. Ili estas kiel la martelaj kaj skulptilaj batoj, kiujn uzas skulptisto por forigi la superfluajn partojn de la marmora aŭ granita bloko tiel, ke li povas krei la belegan skulptaĵon kiun lia kreanta fantazio vidis en ĝia interno. Tiel iom post iom Dio eligis la figuron kaj konscion de la tera homo el la stato de mineraloj, plantoj kaj bestoj. Sed ankoraŭ mankas parto antaŭ ol tiu kreoproceso rezultigos la aperon de la perfekta homo.

**7. La akvo kaj la aero estas fizikaj vivelementoj por vivaj estuloj**

La kreometodoj de la naturo, kiuj estas la samaj kiel la kreometodoj de Dio, do montriĝas kiel granda proceso de transformiĝo aŭ evoluo, kie la vivaj estuloj malrapide glitas de unu stato al alia kaj evoluigas novajn kapablojn kaj talentojn, kiuj efikas kaj en ilia organismoformado kaj en ilia vivdisvolvo kaj vivtravivado. De la fizika scienco ni scias ke la mambestoj, al kiuj apartenas la tera homo, iam en antaŭ longe malaperinta tempo evoluis de bestoj kiuj vivis en la akvo. En la organismoj de certaj specioj de fiŝoj evoluis la komenco de pulmosistemo kaj de membroj, per kiuj ili povis movi sin sur la tero. La aero fariĝis ilia vivelemento anstataŭ la akvo. Sur la terglobo do troviĝas du vivelementoj por la vivaj estuloj, la akvo kaj la aero. En la akvo vivas estuloj kiuj spiras per brankoj, kaj en la aero estuloj kiuj evoluigis pulman sistemon. Oni ne povas interŝanĝi tiujn du specojn de estuloj kaj igi la brankestulojn vivi en la aero, kaj la pulmoestulojn en la akvo, kio signifus la fizikan morton por ili. Sed iom post iom la fiŝoj evoluas por povi vivi en la aero. Tio kompreneble daŭras nemezureble longan tempon,

sed daŭris ankaŭ longan tempon antaŭ ol la estuloj, kiuj nun estas teraj homoj, evoluis al mambestoj, al primitivaj kaj post tio al civilizitaj, teraj homoj. Iam kiam la fiŝoj komencos povi vivi en la aero, ili ne plu estos fiŝoj en pura formo, ili estos transiraj estuloj al la aera kaj pulma stato.

**8. Malamo kaj ĉioamo estas psikaj vivelementoj**

Nuntempe io simila validas por la teraj homoj. Ankaŭ ili vivas en du vivelementoj, kaj estas forlasantaj la unu favore al la alia. Tiuj du vivelementoj tamen ne estas fizikaj, sed psikaj. La unu estas ĉioamo, la alia estas milito aŭ malamo. La absoluta ĉioamo estas kosma aerelemento, rilate al kiu la milito aŭ netoleremo estas kiel kosma akvoelemento. La perfektaj homoj estas la pulmoestuloj de la kosma vivo, dum la neperfektaj aŭ nefinevoluintaj homoj estas la kosmaj brankestuloj, kiuj en pli aŭ malpli alta grado komencas adapti sin al nova vivelemento laŭ tio, kiel en sia konscio ili evoluigas la amkapablon. Kaj laŭ tio, kiel ankoraŭ ili semas ĉirkaŭ si militon, venĝon, malamon, amaron kaj netoleremon, ili ankoraŭ vivas en la mensa vivelemento, kiu estas komparebla kun la submondo de la maro, kie la lumo de la suno estas forbarita aŭ malfortigita de la akvomasoj. Nuntempe ĉiuj homoj pli aŭ malpli troviĝas en la mallumo aŭ en la lumo, en la mallumaj akvoprofundoj aŭ supre en la pura aero kaj la brila sunlumo, kie oni povas rigardi super la akvoj kaj vidi la spiriton de Dio ŝvebi super tiuj akvoj.

**9. Ĉiu tera homo vivas en sia natura vivelemento en miksaĵo de mallumo kaj lumo.**

La teraj homoj ne plu estas mense perfektaj mallumestuloj, sed ili ankaŭ ne estas mense perfektaj lumestuloj. Ili vivas en transira stato de mallumo al lumo. Plej ofte ili ĉirkaŭvagas en la mensa akvoelemento, en la elemento de egoismo, al kiu konformas iliaj kutimoj kaj inklinoj evoluintaj dum multaj vivoj, same kiel la brankoj de la fiŝoj konformas al la akvo. Tie ili kompreneble ankaŭ estas ĉirkaŭitaj de estuloj kies konscio estas adaptita al la elemento de egoismo. Tiuj estuloj "semas kaj rikoltas" en interagado unu kun la aliaj, kaj tio kion ili semas, plej ofte estas milito, akcidentoj, sufero, ĉagreniĝo kaj ĉio alia el simila speco kio estos rikoltata kiel mallumaj sortoj. La homoj tre ofte plendas pri la estmaniero de iliaj kunestuloj, sed kial ĝuste tiuj pli aŭ malpli malagrablaj homoj estas iliaj ĉirkaŭuloj? Ĉar ankoraŭ tiuj homoj estas parto de ilia natura vivelemento. Kiamaniere ili do liberiĝos de tiu elemento? Per evoluigo de la spiritaj organoj kiuj iom post iom laŭ natura maniero kunligos ilin kun la nova elemento pri kiu ili sopiras. Tio kio estas evoluigenda estas pardonado, kompreno kaj amo. Oni ja ne povas riproĉi al fiŝo ke ĝi estas fiŝo, kaj ne birdo aŭ mambesto. Same oni ankaŭ ne povas riproĉi al tera homo kiu iamaniere estas malagrabla al ni mem, ke li aŭ ŝi estas tia. En la koncerna momento ili ne povas esti alispeca, kvankam iam ili fariĝos. Kaj la malagrabloj, kiujn ni renkontas en la elemento de mallumo per tiuj homoj, ni mem semis en la elemento de mallumo, alie ni neniam renkontus ilin.

**10. La pensklimato de alproksimula amo protektas la homon kontraŭ malluma sorto.**

Sed kiam ĉesos tiu ŝajne senfina ĉeno de semo kaj rikolto de egoismo? Ĝi ĉesos kiam la viva estulo, kvankam ĝi renkontas semon de milito aŭ egoismo kiun ĝi semis en la pasinteco, rezignos reagon per egoismo kaj milito. Kie la spiritaj organoj de amo, toleremo kaj komprenemo evoluas ĉe la tera homo,

tie la “ĉiela regno” aperas kiel vivelemento, kaj la vivelemento de milito aŭ “infero” degeneras. Ankaŭ estiĝas en la aŭro de la homo la sola, ekzistanta protektilo kontraŭ la mallumo, kaj ĝi estas la pensklimato de la alproksimula amo. Iom post iom ĝi fariĝos ankaŭ tiu faktoro kiu protektos la homojn kontraŭ malsanoj, akcidentoj, naturkatastrofoj kaj multaj aliaj aferoj kiuj apartenas al la pensklimato de la mallumo. Sed kial do nuntempe tiom da bonaj kaj amaj homoj estas trafataj de malsanoj, akcidentoj aŭ aliaj suferoj kaj malagrabloj? Tiun demandon oni renkontas fojon post fojo. La kaŭzo estas, ke la deziro de tiuj homoj vivi en la vivelemento de alproksimula amo kaj paco komencas plenumiĝi, kaj povos tute plenumiĝi nur kiam tiu semo, kiun ili semis en la vivelmenento de malamo, estos rikoltita kiel la spertoj kiuj formas la spiritajn organojn por la nova vivelemento. Tio okazas kiam la necesa imago pri danĝero, la necesaj konscienco kaj kompreno pri kaj kunsento kun aliaj vivaj estuloj, fariĝis grava bazo por la vivdisvolvo de la homo. Tio estas vera iniciĝo, provo pri spirita maturec o. Se la homo povas akcepti tiujn malfacilaĵojn, kaj venki ilin sen amaro aŭ iritiĝo, ĝia konscio pli kaj pli fariĝas unu kun la pensklimato de la amo aŭ tiu vivelemento kiun Kristo nomis la “ĉiela regno”.

De manuskripto de prelego dimanĉo la 18.07.1949 en Martinus Centro Klint. Prilaborita de Mogens Møller kaj aprobita de Martinus. La unuan fojon en dana *Kontaktbrev* n-ro 16/1959. Artikolo n-ro: M2330. Traduko Ib Schleicher.



*Martinus, Henning Laug (Esperanto-sekcio), Tage Edeling, Per Bruus-Jensen kaj Ib Schleicher (Esperanto-sekcio) en ĉambro de Martinus en 1965. Fotaĵo Arne Henriksson.*

# Kiel oni lernas antaŭmalhelpi elreviĝojn

de Martinus



M31829

**Kara sinjorino NN!**
Mi ricevis vian leteron de la 3-a de septembro. Mi vidas ke vi nuntempe spertas grandan elreviĝon. Mi nur povas diri, ke oni per mia laboro lernas antaŭmalhelpi elreviĝojn. Oni neniam havu pli grandajn esperojn ol tiujn pri kies plenumiĝo oni estas sufiĉe certa. Tiel oni ĉiam spertos pli grandan ĝojon ol atendite, kaj la vivo fariĝos hela kaj facila. Alikaze oni ĉiam spertos malpli grandan ĝojon ol atendite, kaj la vivo pleniĝas per elreviĝoj. Kiel vi vidas, kara sinjorino NN, vivi la vivon estas arto. Por krei arton oni evoluigu talentojn; por evoluigi talentojn oni devas trejni sin. Ekzercado kreas majstron. Neniu ekhavos veran longdaŭran ĝojon kaj feliĉon, kio signifas la perfektan arton de la vivtravivado, krom “en la ŝvito de sia vizaĝo”. Kristo konfirmas ĉi tion per admoni la homojn “preĝi kaj labori”.

Sed kiel eblus ekzerci sian vivartan kapablon kaj fariĝi artisto de vivtravivado, kio signifas la perfektan homon, la moralan genion, se la Providenco ne kreus antaŭkondiĉojn por trejnado kaj instruado en tiu ĉi arto? Kara sinjorino NN, se vi havus ĉiujn viajn dezirojn plenumitaj kaj neniam spertus kontraŭventon, kio signifas: elreviĝojn kaj iritadon, kiamaniere vi tiuokaze ekkonus la karakteron de ĉiuj aferoj? Kaj sen tiu ĉi kono tute mankus al vi la kontrasto aŭ la fono, kiu sole povas doni al vi la veran vivspertadon.

Ni ĉiuj devas trairi tiun ĉi lernejon de la vivo. Ĉar ĝi havas la supre menciitan celon kiel rezulton, ni ĉiam estas en kontakto kun vera logiko kaj intelekto, kiam ni kiel Kristo direktas nin al la plej perfekta sinturno al la Providenco kiu entute estas manifestebla, nome la jena: “Patro, plenumiĝu via volo, ne mia.”

Kara sinjorino NN, vi opinias ke la tuta mondo preskaŭ rompiĝis por vi, ĉar vi ne ricevis la deziratan postenon. Sed tiel tute ne estas. La Providenco scias kio plej utilas por vi. Same kiel la plimulto de homoj, vi mem konsideras nur tion, kio plej feliĉigus vin ĝuste nun. Sed la Providenco konsideras tion, kio plej bonas por vi longdaŭre, kio signifas: estontece, tute ĝis la venonta vivo. Kaj pro tio vi mem zorgu akordiĝi kun la Providenco. Tiel estos facila afero superi la malagrablaĵojn. Iom post iom ili iĝos bagateloj. Kion signifas tio, kion oniaj kolegoj kaj amikoj pensas pri oni, se oni mem scias ke oni estas en kontakto kun la vivo? Ĉiu sensenca kritiko kaj antipatio de la ĉirkaŭantaro vere estas nur “bojado”. La homoj ankoraŭ ne elkreskis “la bojadprincipon”. Ili ankoraŭ havas la karakteron de hundo en sia interno. Ili “bojas” al ĉio kion ili ne komprenas. Sed ankaŭ “bojado” havas sian bonan flankon. Ĝia misio estas averti la gregon. Kaj pli poste, kiam la hundo servas al la homo, ĝi bojas por averti sian mastron. Kiam la homoj bojas, ankaŭ ili tion faras por averti siajn mastrojn. Ili sekve pensas ke ili protektas “la moralon” kaj tiel servas al la Providenco. Kaj pro tio oni pardonu ilin.

La Providenco certe instruos al ĉi tiuj estuloj "boji" ĝustaloke.

Kara sinjorino NN, vi do lernu vidi ĉion alimaniere. Vi devas vidi la vivon el la elirpunkto de Dio. Kaj tiam vi vidos, ke la vivo estas tute alia, perfekte luma kaj amika, ol tio kion vi ĉimomente vidas. La Providenco prenis vian manon kaj kondukis vin for de io kio absolute estus malfavora por via estonteco. Do, vi lernu, same kiel Job, akcepti vian sorton kun ĝojo, kiel ajn ĝi ŝajnas al vi. Ĝi estas kaj pluestos la maniero de la Providenco konduki vin hejmen al sia propra amosfero. La sorto estas la absolute sola vojo al la ĝojo, la lumo kaj la vivo, pro tio ke ĝi iras tra Getsemano, supren tra Golgato, malsupren en la mallumon de la tombejo, por ekde tiam povi iri en la klaran dian lumon de la releviĝo. Estu do trankvila, kara sinjorino NN. La Providenco certe scias kiel konduki vin pluen. Kaj vi do mem partoprenas en tiu ĉi kondukado agordante vin repacige al ĉio kaj ĉiuj. Tio ĉi postulas fortostreĉon, sed kun la ĝusta sinteno al la vivo venos ĉiuj fortoj kiujn oni bezonas.

Kaj kun tio, la plej bonajn dezirojn kaj pensojn al vi en "la bona batalo", kaj ankaŭ miajn plej varmajn salutojn!
Martinus

La artikolo estas redono de letero de Martinus, datita la 10-an de septembro 1940. Prilaboro de Torben Hedegaard. Aprobita de la konsilio la 01.04.2017. Unuan fojon en dana *Kosmos* n-ro 4, 2018. Originala dana titolo: "Hvordan man lærer at forebygge skuffelser". Artikolo n-ro: M31829. Traduko Henning Sato von Rosen kaj Hokan Lundberg.



*Martinus en 1954 ĉe skribotablo en sia salono en Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Frederiksberg, Kopenhago*



# Martinus kaj Kriŝnamurti 2

## Pri la venonta mond-instruisto, parto 2 el 3

de Ole Therkelsen

**7. Ĉu "La Orienta Stelo" estus kapabla helpi al Martinus?**
De pluraj flankoj oni demandis al Nibelvang: Kial vi ne turnis vin al "La Orienta Stelo"? – Jen vi ja havas asocion fonditan kun la celo servi kaj ebenigi la vojon al la venonta mond-instruisto. Ĝi estas granda kaj memofera asocio, kiu nombras adeptojn el ĉiuj sociaj klasoj kaj etendas siajn branĉojn sur la tutan teron (foje kun 41 membrolandoj). Ĉu ne dum longa vico da jaroj ĝiaj gvidantoj utiligadis ĉiun okazon por prepari la homojn, ke tia granda instruisto povos aperi kie ajn kaj en kiu ajn formo? – Eĉ pli, ĉu ne krom tio ĝia patrono aludis la eblecon ke la mond-instruisto eventuale povos aperi en la formo de virino? (Vidu La reveno de Kristo de Annie Besant).

Jes, la programo estis tre tolera kaj internacieca, kaj en la sesa fundamenta regulo estis enplektitaj jenaj vortoj: "Ni rigardas kiel nian apartan devon serĉi, ekkoni kaj honori grandecon, ĉe kiu ajn ĝi montriĝos, kaj laŭeble klopodi por kunlabori kun tiuj, kiujn ni sentas spirite superaj al ni."

Ĉar tiu sesa fundamenta regulo dum tiel longa vico da jaroj estis enmemori-



*Lars Nibelvang kaj edzino.*

gita al la membraro, Nibelvang opiniis ke ĝuste tie ĉi, laŭ la naturo mem de la afero, li atendu komprenemon, apogon, helpon kaj agnoskon pri la rolo de Martinus kiel la nova mond-instruisto. Aliflanke li sentis ke li, nekonato, staris tute sola antaŭ internacie organizita, finance forta kaj ŝajne aŭtoritate firmigita societo de homoj, kiuj per sindediĉo kaj preskaŭ sugestia fido jam agordis sian konscion al la lumo – el oriente.

### 8. Kiam Nibelvang sendis sian leteron al Besant?

En 1923 Nibelvang do ellaboris longan leteron de 31 grandformataj paĝoj al Annie Besant, sed montriĝis ke daŭros multaj monatoj antaŭ ol tiu letero estos sendita. Nibelvang certe povis legi librojn anglalingve, sed li ne estis tiel perfekta ke li kuraĝis skribi tiel gravajn pensojn en la angla. Ankaŭ mankis al li la mono por pagi aprobitan tradukiston, kaj krome li ne kuraĝis liveri sian scion al ĉiu ajn en tiu ĉi frua tempo, kiam la mondbildo ankoraŭ ne estis komplete firmigita kaj science motivita.

Li decidis kontakti unu el la elstaraj membroj de la dana sekcio, s-ino Schiøtt en Gammel Kongevej, Kopenhago, kiu laŭdire estus aparte lerta pri la angla lingvo. Li esperis ke ŝi en provizora konfidenco senpage tradukos la leteron, kaj en oktobro-novembro 1923 li interŝanĝis kelkajn singarde vortigitajn leterojn kun ĉi tiu spertulino. Ŝi staris nun, ne sciante tion, antaŭ tutvive unika ŝanco, kiu tamen pordofrapis iom alivestite kaj modeste. Por la unua fojo prezentiĝis al ŝi okazo fari al granda instruisto komplezon. Sed kiel Nibelvang preskaŭ atendis, li ricevis rifuzon. Ŝi estis tro okupita preparante la "Venon de la Majstro". Sekve li decidis formeti kaj la penson kaj la leteron por lasi la eventojn mem paroli.

Oni facile imagas ke en 1923, nur du jarojn post kiam Martinus ekhavis kosman konscion, estus malfacile argumenti aŭ motivi ke li estas la venonta mond-instruisto, ĉar ankoraŭ li nenion skribis, nek desegnis simbolojn pri la mondbildo. Sed printempe de 1925 Nibelvang revenis al la penso pri la letero, ĉar li sentis ke lia pruvaro plifortiĝas de monato al monato, kaj li decidis sendi sian leteron danlingve al Besant, esperante ke ŝi mem scios trovi konsciencan tradukiston. Nun la kubo estis ĵetita, kaj proksimiĝis la momento kiam ŝi devis pritaksi novan kaj surprizan mesaĝon surbaze de tiuj senantaŭjuĝeco, universala vidlarĝo kaj toleremo, kiujn ŝi mem de generacio encerbigadis al siaj teozofiaj disĉiploj. Nun la belaj vortoj de la ordeno trapasu la ekzamenon, laŭ li.

Lars Nibelvang, kiu printempe de 1925 sendis tiun leteron kiel registritan rekte al la adreso de Besant, ne ricevis respondon al ĉi tiu sinturno. La letero de Martinus mem al Kriŝnamurti, kiu estis sendita kelkajn monatojn antaŭe, en decembro 1924, ŝajne ankaŭ estis senrezulta.


Sed eble tamen venis nerekta respondo en la formo de tiu parolado kiun Besant kelkajn monatojn poste eldiris en aŭgusto 1925 en la jarkongreso de la Stelo en Eerde, Ommen, en nordorienta Nederlando. Ĝi fariĝis tre pridiskutata kaj grava parolado, montriĝonta tute fatala same al la ordeno kiel al ŝi mem.

### 9. La parolado de Annie Besant en Camp Ommen la 11-an de aŭgusto 1925

Kriŝnamurti ne partoprenis la somertendaron en Ommen, ĉar li estis en Kalifornio ĉe sia mortanta frato. Pro la foresto de Kriŝnamurti oni ŝanĝis la programon, kaj Annie Besant prezentis kelkajn tre surprizajn eldirojn en sia granda ĉefparolado, eldirita la 11-an de aŭgusto 1925 – je la 35-jara naskiĝtago de Martinus. Ŝi elstarigis sian propran



*Martinus en 1921.*



*Martinus en 1980.*

aŭtoritaton dirante ke ŝi estis en kontakto kun la plej altaj, nevideblaj gvidantoj de la blanka frataro, kaj uzante esprimojn tiel aŭtoritatajn kaj potencajn kiel "la Reĝo ordonis …", "tio kion mi ĉi tie proklamas, estas ordonita de la Reĝo al kiu mi servas ktp. …", kaj estis mesaĝoj de Lordo Majtrejo (Kristo) kaj liaj potencaj fratoj (la majstroj) (International Star Bulletin, Oct. 1925).[1]

En la teozofia doktrino oni parolas pri tio ke ekzistas okulta organizo, la granda blanka frataro, kiu estas spirita hierarkio kun diversaj rangoj. La supera ĉefo de la terglobo kun ĝiaj spiritaj mondoj estas Sanat Kumara, nomata la Reĝo. Sub la reĝo venas do la diversaj bodisatvoj, mond-instruistoj, mahatmoj, majstroj, adeptoj ktp.

Ŝi anoncis ke Lordo Majtrejo (Kristo) baldaŭ manifestiĝos, kaj ke li definitive elektis Kriŝnamurti-n kiel sian ilon. Li ankaŭ elektis siajn 12 apostolojn, el kiuj ŝi tre mirige povis indiki sep per iliaj nomoj, inkluzive ŝin mem. Tri el la apostoloj estis ĉeestantaj episkopoj de la liberal-katolika eklezio, Leadbeater, Arundale kaj Wedgwood. Jen, ĉi-foje la apostoloj ne estis elektitaj el inter malriĉaj fiŝkaptistoj.

La Sinjoro precizigis ke ili koncentru la laboron pri tri gravaj aktivadoj: la liberal-katolika eklezio, la fondo de teozofia universitato kaj la fondo de geaj framasonaj loĝioj, konsistontaj de kaj viroj kaj virinoj, la t.n. "co-masonry". Pluraj el la elektitaj apostoloj faris paroladojn kaj entuziasme parolis pri tio ke Majtrejo instruos en la teozofia universitato, ke estos religiaj ceremonioj, ktp.

Du tagojn poste ŝi substrekis ke la liberal-katolika eklezio eĉ estos la koro en tiu instruado kiun donos Kristo. En la tendaro estis aranĝitaj subĉielaj religiaj procesioj kaj ceremonioj, episkopoj kun mitro kaj purpura mantelo disdonis

benojn, kaj estis religieca, adventista entuziasmo tra la tuta tendaro.

---

1. La fontojn de 1925-1934 pri Kriŝnamurti mi mem danigis el la franca. Je la 80-a datreveno de la letero de Martinus al Kriŝnamurti, sabaton la 4-an de decembro 2004, mi prelegis en franca lingvo en "Bibliothèque Pythagore" en Strasburgo (oletherkelsen.dk). – En ĉi tiu esotera biblioteko troviĝas ĉ. 8000 libroj, kaj estis duonmetro da libroj kaj fontoverkoj pri Kriŝnamurti, pri kiuj mi enprofundiĝis dum la resto de la tago. Nokte post la prelego vekis min forta tertremo. Iom gaje mi interpretis la tertremon kiel saluton al mi de la tergloba estulo, lige al tio ke mi esploris la problemaron de mond-instruisto. Lunde mi legis en la gazeto "Le Figaro" ke la tertremo havis fortecon de 4,9 laŭ la skalo de Richter, kaj ke la epicentro troviĝis malpli ol 100 kilometrojn for de Strasburgo.

**10. La reago al la parolado de Besant pri la ordonoj de la Reĝo**

Nibelvang kaj Martinus interpretis la paroladon de Annie Besant en 1925 kiel respondon al la du leteroj. Per sia parolado ŝi volis substreki ke ne Martinus, sed Kriŝnamurti estos la nova mond-instruisto! – En konversacioj Martinus referencis al la esprimo "la Reĝo ordonis", kiam li rakontis pri la nerekta respondo, kiun li opiniis esti ricevinta al sia letero al Kriŝnamurti kun la sciigo ke la nova mondoklerigo eliros el Danio. Martinus opiniis ke la forta intuicia impulso en decembro 1924, ke li sendu al Kriŝnamurti leteron, eble kaŭzis ke Kriŝnamurti iĝis iom necerta. Poste Kriŝnamurti ja demetis de si la rolon de mond-instruisto, kaj li neniam volis viziti Danion, dum li kelkfoje venis al Svedio.

En 1925, kiam Kriŝnamurti estis atinginta la 30-an vivojaron, kiu estis la normala aĝo de inico, Besant sentis sin devigita, eble pro malkvieto



*Kriŝnamurti prelegas en Ommen en Nederlando.*

inter la membraro, oficiale substreki ke Kriŝnamurti efektive estas la nova mond-instruisto. Ankaŭ al eksteruloj en la estonteco ŝiaj eldiroj pri tio devis esti ne miskompreneblaj. Ordonis la Reĝo!

Pluraj membroj multe mistifikiĝis kaj estis tre skeptikaj al ŝiaj revelacioj kaj religiaj iniciatoj en la tendaro. Ankaŭ Kriŝnamurti mem distancigis sin al tio, kaj li malferme deklaris ke malplaĉis al li la religiaj ceremonioj, kaj la jaron poste, en 1926, estis neniuj religiaj ceremonioj en la granda ĉiujara somera tendaro en Ommen en Nederlando.

### 11. Kriŝnamurti deklaras sin mem mond-instruisto en 1927

Kelkajn monatojn poste Kriŝnamurti ekhavas grandan spiritan travivaĵon, kredeble tio kion Martinus nomas kosma ekbrilo. El tio rezultas ke Kriŝnamurti nun unuafoje mem deklaras sin mond-instruisto. Printempe de 1927 li en privata rondo eldiris jene: *"Koncerne min mem mi diras tute simple: Mi atingis la liberiĝon, tio estas la homan perfektiĝon. Antaŭ ses monatoj mi ne povis tute honeste prezenti tiun deklaron, ĉar tiam mi ankoraŭ ne fariĝis mond-instruisto."* (Ludowic Réhault, L'Instructeur du Monde – Krishnamurti, Les Tables d'Harmonie Édition, Nice 1934).1

La 2-an de aŭgusto 1927 en Camp Ommen li mem unuafoje publike deklaris ke li estas la mond-instruisto. Annie Besant staris ĉe lia flanko, kaj kvankam li siatempe malakceptis la apostolojn kaj ŝiajn revelaciojn en 1925, ŝi tamen lin agnoskis dirante: "Ĉar mi diris ke la mond-instruisto venos, mi nun havas la ĝojan novaĵon ke li ĉeestas ĉi tie". Li mem diris: *"Antaŭe mi ne diris ke mi estas la mond-instruisto, sed atinginte la unuiĝon kun la alte amata, mi tion diras".* (Int. Star Bull. Dec. 1927).

En la ekzistantaj biografioj pri Kriŝnamurti oni pretersilentas ke *Kriŝnamurti efektive mem deklaris sin*



*Kriŝnamurti parolas en Ommen.*

*mond-instruisto*. Oni normale prezentas la aferon tiel ke Anni Besant kaj La Orienta Stelo estus tiuj respondecaj por proklami Kriŝnamurti-n mond-instruisto, sed li tion mem deklaris.

La sekvan jaron en Camp Ommen 1928 li ankoraŭfoje deklaris ke li estas la mond-instruisto. *"La vero estas ke mi estas la mond-instruisto kaj Kriŝnamurti ne plu ekzistas. Same kiel la rivero unuiĝas kun la oceano, mi unuiĝis kun tiu ĉi vivo, kiun reprezentas interalie Budho, Kristo kaj Majtrejo."* (Int. Star Bull. Nov. 1928).

Ekde oktobro 1927 Kriŝnamurti tutmonde vojaĝadis kiel mond-instruisto kaj estis triumfe akceptata en Hindio, Usono, Ĉinio, Japanio, Brazilo, Eŭropo, kaj ĉie estis grandiozaj bonvenigoj al li. En 1928 li parolis al ne malpli ol 16.000 homoj en Hollywood Bowl kaj ankaŭ al grandegaj kunvenoj de miloj da aŭskultantoj en Nov-Jorko, Ĉikago, Londono kaj Parizo.

Kiam Besant paroladis pri *la veno de la mond-instruisto*, ŝi parolis pri *"la Sinjoro de la Mondaj Religioj"*, kaj tio ĉiam pli konfliktiĝis kun la rezisto de Kriŝnamurti kontraŭ religioj kun dogmoj kaj ritaroj, kaj li ĉiam pli kontraŭis la eldirojn de la teozofiaj ĉefoj. Li diris, ke se oni volas trovi sin mem kaj atingi la liberecon, oni devas liberigi sin el la kredo je religioj, homoj kaj aŭtoritatoj.

Aliflanke Wedgwood deklaris ke Kriŝnamurti ne havas la altajn vibradojn de iu Kristo. Pluraj ordenanoj vidis en la enigma personeco de Kriŝnamurti ne tiun personan manifestiĝon de Kristo kiun ili esperis, kaj li ne impresis konvinka al ili. (Ludowic Réhault, 1934).

Rompo inter Kriŝnamurti kaj la teozofoj estis survoje, kaj ĝi montriĝis tre baldaŭ okazonta.

**12. Kriŝnamurti demetas de si la mond-instruistan rolon**

"La Orienta Stelo" estis dissolvita en la tendaro en Ommen 1929, kiu estis malfermita la 2-an de aŭgusto. Sabate la 3-an de aŭgusto Kriŝnamurti eldiris sian paroladon en kiu li dissolvis la organizaĵon en la ĉeesto de Annie Besant kaj pli ol tri mil ordenanoj, krom pluraj miloj da nederlandaj radioaŭskultantoj.

Laŭ la libro *Memoroj de Martinus* estis jene: "Je la tago de mia 39-jara naskiĝtago la 11-an de aŭgusto 1929 Kriŝnamurti dissolvis la asocion formitan ĉirkaŭ lia persono, kaj li deklaris ke li ne deziras adeptojn." – Ĉi tiu informo kredeble venis de Lars Nibelvang, kiu skribis en sia taglibro: La 11-an de aŭgusto 1929 (naskiĝtago de Martinus) Kriŝnamurti dissolvis la asocion "La Orienta Stelo"!

Sed ĉi tiu dato de la dissolvo ne tute kongruas kun la originalaj fontoj, kiuj indikas ke Kriŝnamurti dissolvis la ordenon unu semajnon antaŭe, nome la 3-an de aŭgusto 1929 (Int. Star Bull. Oct. 1929, Ludowic Réhault 1934, Mary Lutyens 1975). Tio ankaŭ konfirmiĝas per la titolo de la aparta presaĵo "11/1-1911 Benares – 3/8-1929 Ommen", eldonita de "The Star Trust Publishing International" okaze de la dissolvo de la ordeno en 1929.

Eble Nibelvang ricevis la novaĵon pri la dissolvo de la ordeno unu semajnon poste je la naskiĝtago de Martinus, aŭ eble okazis intermikso, ĉar Besant ĝuste je la naskiĝtago de Martinus la 11-an de aŭgusto eldiris la famajn vortojn "Ordonis la Reĝo", per kiuj ŝi supozeble rifuzis la enhavon de la leteroj de Martinus kaj Nibelvang.

**13. Kriŝnamurti tre feliĉiĝis demetante de si la rolon de "Nova Mesio"**


Sub la titolo *Kriŝnamurti retiras sin* la dana taggazeto Ekstra Bladet en 1931 publikigis resumon de intervjuo al Kriŝnamurti:

"Kiam antaŭ nelonge Kriŝnamurti, la juna teozofo kaj filozofo nomata la Nova Mesio, iris hejmen al Usono, lia reveno ne kaŭzis multe da ekscitiĝo; tuj post la alveno en Los-Anĝeleso Kriŝnamurti konsentis intervjuon al la Los-Anĝelesa gazeto "Herald Examiner". Dum la konversacio la hindo parolis tute malkaŝe kaj sincere, deklarante ke li estonte tre malpetas esti nomata "la Nova Mesio" kaj "la Savanto de la Homaro".

La junaĝa filozofo, kiun Annie Besant, la ĉefo de la teozofio, oficiale deklaris esti la granda mond-instruisto per kiu la homaro estus ricevonta novan pardonon por siaj pekoj, nun deklaras ke li redonis la kalifornian kastelon, kiun oni trudis al li akcepti,



*Kriŝnamurti kaj Annie Besant.*



*Kriŝnamurti legas libron.*

krom aliajn riĉaĵojn al la originaj posedantoj – bonintencaj amikoj, kiuj certe agis tute bonfide.

Kriŝnamurti ne ĉesos esti teozofo, li deklaras, sed estonte neniu titolu lin “Majstro” aŭ “Senjoro”. – Mi volas esti libera, rajti vivi mian propran vivon, pensi miajn proprajn pensojn, diras Kriŝnamurti, kaj de kiam mi alprenis ĉi tiun decidon, mi estas pli feliĉa ol mi estis iam antaŭe.


Krome Kriŝnamurti diras en ĉi tiu intervjuo ke kiam d-rino Besant rakontis al li, dum li ankoraŭ estis juna knabo, ke li estas enpersoniĝo de Kristo, li kredis la anglinon. – Nun mi scias ke mi ne estas Kristo pli ol vi estas, diris Kriŝnamurti al la intervjuanto.” (Dana gazeto Ekstra Bladet, 25. nov. 1931).


**14. Kriŝnamurti daŭrigas memstaran aktivecon**

La Ordeno de la Orienta Stelo, kiu estis tre riĉiĝinta, estis dissolvita en 1929 en kvin apartajn sekciojn. En unu el ĉi tiuj sekcioj, la Fonduso de Kriŝnamurti (Krishnamurti Foundation), li daŭrigis propran memstaran aktivecon, kiu danke al liaj multaj bonegaj libroj, paroladoj kaj videoregistraĵoj donis utilon, ĝojon kaj inspiron al milionoj da homoj tutmonde. (jkrishnamurti.org, kfa.org).

Kriŝnamurti, estante tre akra, logika kaj racia, inspiris multajn homojn malakcepti la kredon de religioj, aŭtoritatoj, sistemoj kaj mondbildoj, stimulante ilin al memstaraj pensado kaj vivkompreno. Kriŝnamurti klarigis ke se oni vere volas trovi sin mem kaj atingi la feliĉon, liberiĝon kaj liberecon, oni devas malligi sin de ĉia kredo je religioj, je homoj, je organizoj kaj aŭtoritatoj. Aliflanke li eble iom mankis al li la komprenemo, toleremo kaj amo al tiuj kiuj troviĝas sur tiaj ŝtupoj de la memevoluo, kie tia kredo por ili estas precize la tute ĝustaj inspirilo kaj vojo al ilia provizora feliĉo.

Kriŝnamurti ĉe la teozofoj lernis pri reenkarniĝo, karmo kaj evoluo, li ne instruis pri ili, aliflanke ankaŭ ne rifuzis ilin. Oni komprenas ke Kriŝnamurti estis satiĝinta pri la teozofia sistemo post la intensa influado, al kiu li estis


*Kriŝnamurti ĉ. 44-jara.*


*Aĝiĝinta Kriŝnamurti.*

submetata de kiam li estis 14-jaraĝa. Li estis tiel supersata ke li evidente tute pretervidis la signifon de spirita scienco aŭ de mondbildo, kaj en lia verkaro ne troviĝas mondinstruo aŭ mondoklarigo kiel tiu de Martinus. – Kriŝnamurti precipe akcentis la metodon de ekkono kaj la propran ekkonon.

Post la morto de Kriŝnamurti aperis kelkaj biografioj, ekzemple de Jeffrey M. Masson, Christoffer Isherwood, Roland Vernon, C.V. Williams, sed plej grandan atenton ricevis libro en 1991 “Lives in the Shadow with J. Krishnamurti” [Vivoj en la ombro de J. Krishnamurti]. La libro estis skribita de amerikanino Radha Rajagopal Sloss (n. 1931), por kiu Kriŝnamurti estis edukpatro. Li kunlaboris kun ŝia gepatroj, Rosalind Williams Rajagopal (1903-1996) kaj D. Rajagopal (1900-1993), kaj laŭ tiu libro Kriŝnamurti dum dudek jaroj ekde 1932 havis kaŝitan aŭ sekretan amrilaton al ŝia patrino Rosalind. En sia lasta publika prelego in Madraso (Ĉenajo) komence de januaro 1986, kiam Kriŝnamurti sciis pri la baldaŭa finpretigo de tiu libro, li substrekis ke ne *la instruisto*, sed *la instruado* estis la plej grava. (François Swaen, Krishnamurti – ombres et lumières, Nouvelles clés, no. 66, Juin–Août 2010, nouvelles-cles.com).

Daŭrigo 3/3 sekvos. Pli da informoj en “Martinus kaj la nova monda moralo”, www.oletherkelsen.dk. La libro ekzistas en Esperanto. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.

# Kiu estas mia proksimulo?

de Martinus

**Demando:**
Kiu estas mia proksimulo? – Ĉu temas nur pri la homoj, aŭ ĉu temas ankaŭ pri la ĉeloj kaj mikroestuloj loĝantaj en mia korpo? – Kaj kial mi amu tiun ĉi Proksimulon?

**Respondo:**
Se la nocio "Proksimulo" estu komprenata laŭlitere, ĝi estas lokoindiko. Ĉi-rilate nia proksimulo sekve estas la estulo, kiu en la fizika spaco estas plej proksima al ni. Estulo povas kiel konate esti tiom proksima al ni, ke ĝi preskaŭ tuŝas nian propran korpon, same kiel ĝi ankaŭ povas esti miloj da kilometroj for. Kiam oni diras, ke oni amu sian proksimulon kiel sin mem, tio sekve laŭlitere signifas, ke oni unuavice amu tiun aŭ tiujn estulojn, kiuj estas ene de nia observaddistanco, kaj kiujn ni pro tio ne povas eviti sperti aŭ senti. Estulojn, kiuj vivas miloj da kilometroj for, ni ja ne povas rekte sperti aŭ senti. Iliaj fartostatoj ja ne povas esti tiom klaraj al ni, kiom de tiuj estuloj kies estado aŭ sorto estas tuj antaŭ niaj okuloj, oreloj kaj ceteraj sentumoj. Estas ĉiu unuopa viva estulo, ĉu planto, ĉu besto aŭ ĉu homo ene de la rekta atingodistanco de tiu ĉi nia sensokapablo, kiu estu la fokuso aŭ la vera ĉefobjekto por la amo, kiun la leĝo de la proksimula amo admonas. Se ĉiuj estuloj ene de tiu ĉi proksimzono de la sentumoj plenumas la menciitan leĝon, kaj ĉiuj tiel estus ĝojo kaj beno por ĉiuj, tiuokaze la regno de la ĉielo jam antaŭ longe estus fakto sur la tero.

Ĉar la konataj kun-estuloj: plantoj, bestoj kaj homoj ne estas la solaj ekzistantaj vivaj estuloj en nia proksimeco, sed nur esprimas loĝantojn de aparta zono, nome "Mezkosmo", kaj pro tio ekzistas multegaj estuloj en alia loko, nome "Mikrokosmo", ankaŭ ĉi tiuj estuloj venos sub la nocion "Proksimulo" kiam oni iom post iom komencas sperti kaj kompreni ilian ĉeestadon. Kaj la demando pri amo al la proksimulo sekve fariĝos aktuala ankaŭ ĉi tie. Ĉi tiujn estulojn do ankaŭ estu amataj, en mala okazo la mallumo aŭ la infero ankaŭ ĉi tie eksplodus. Tio ĉi ne malfacilas kompreni, kiam oni ĉi tie povas vidi, ke temas pri ĉiuj milionoj da vivaj estuloj: ĉeloj kaj molekuloj ktp., el kiuj nia korpo konsistas. Al ĉi tiuj mikroestuloj ni havas rektan ligon kaj interŝanĝon per nia rilato al la menciita korpo, kiu estas la loĝejo aŭ universo de ĉi tiuj estuloj. Ni jam scias, ke se ni manĝas malĝustan manĝaĵon kaj ĝuas malĝustan trinkaĵon, se ni ne ricevas sufiĉan dormadon kaj superŝutas nin per dura laboro, nia ĝenerala bonfarto malboniĝas. Malsanoj, venenadoj, tumurkreado, nervkolapso ktp. furiozas en la interno de nia korpo. Same kiel fariĝas milito kaj kataklismo/ragnaroko tie, kie ni ne havas reciprokan amon, sekve fariĝas milito kaj ragnaroko, doloro kaj pereo tie, kie ni ne amas aŭ estas beno por la mikroestuloj de nia organismo. Pro tio estos absolute necese

ami ankaŭ siajn mikroestulojn, same kiel ni amas nin mem. Nia rilato al la mikroestuloj tiel fariĝos tre prema parto en la nova spiritscienca mondmoralo, kvankam ĝi estas preskaŭ tute ignorata en la transdonitaj religiaj preskriboj de la malnova mondo.

Sed krom mikrokosmo kaj mezkosmo ekzistas ankoraŭ unu kosma loko por vivaj estuloj. Tiu ĉi loko nomiĝas “Makrokosmo”. Ankaŭ kun loĝantoj de tiu ĉi kosmo ni estas en tre grava interŝanĝado. En tiu ĉi okazo estas aparte la makroestulo, kiu havas la terglobon kiel organismon, al kiu ni estas ligitaj. La terglobestulo simile kiel la ceteraj makroestuloj vivas en tempo- kaj spacodimensia sentado el tute aliaj dimensioj ol nia propra tempo- kaj spacodimensia apero. La minutoj kaj horoj de tiuj ĉi estuloj signifas por niaj sentumoj jarmiloj aŭ jarmilionoj. Pro tio ni ne povas konscirilate rekte korespondi kun ili. Iliaj vivspertosferoj situas same tiel alte super nia propra vivsfero, kiel tiu ĉi estas alte super niaj mikroestuloj. Sed eĉ se ni ne konscie povas interŝanĝi pensojn aŭ parolon kun nia propra aŭ kun iu alia makroestulo, tamen ekzistas vojo, per kiu ni povas veni al rekta plentagokonscia kontakto kun la ekzistanta plej alta kreanta vivo en makrokosmo. Ĉiuj makroestuloj same kiel mez- kaj mikrokosmaj estuloj estas ĉiuj organoj en unu granda estulo. Kiam tiu ĉi granda estulo sekve havas ĉiujn ekzistantajn vivajn estulojn kiel organojn, sens- kaj parolinstrumentojn, ĝi povas korespondi ne nur per ĉiuj lingvoj de la mondo, sed ankaŭ per la lingvoj de ĉiuj planedoj kaj makroestuloj same kiel per la lingvoj de ĉiuj ekzistantaj mikroestuloj. Ke ĝi sekve ankaŭ havas kapablon korespondi kun ĉiu unuopa homo devus esti memkompreneble. Tiu ĉi ĉiespatra estulo sekve parolas al homoj per homoj. Ĝi parolas al la bestoj per bestoj. Ĝi parolas al krimuloj per krimuloj, same kiel ĝi parolas al sanktuloj per sanktuloj. Ĝi povas veni en ondolongon kaj sekve en kontakton kun ĉiuj. Estas tiu ĉi estulo, kiun ni konas sub la nocio “Dio”. Kiam estulo preĝas aŭ vokas al Dio, tiu ĉi preĝo aŭ voko estas aŭdata per unu aŭ alia fizika aŭ psika estulo, kiu rilate al la antaŭa ja estas la perceptilo de Dio, kaj la estulo estos certe helpata. Sed kelkfoje la helpo estas nur psika, kaj la estulo pro tio ne ĉiam malkovras, ke ĝia preĝo plenumiĝis. Kiam tiu ĉi eterna Dio sekve estas nia absolute vivpremisa proksimulo, oni ĉi tie komprenas la eternan amoleĝon, tia kia ĝi herediĝis al ni de pasintaj tempoj, kaj kia ĝi de ni en formo de spirita scienco senŝanĝe transvivos al venontaj tempoj:

Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem. Tio ĉi estas la plenumiĝo de ĉiuj leĝoj.

El dana *Kosmos*, nr. 11, 1987, p. 218. Publikigita la unuan fojon en letero n-ro 18/1951. Artikolo n-ro: M3023. Traduko: Hokan Lundberg.



## Simbolo n-ro 7,

# La principo de vivunuoj aŭ la unua videto de la ekzisto de Dio


Citaĵo el "La eterna Mondbildo 1"

**La terglobo estas nia makroestulo**

**7.5** Tiuj vivprogresigaj kreoprocesoj de la naturo estas do internaj funkcioj de la organismo de kreanto aŭ viva estulo. Ni vivas do en la interno de organismo, kaj ni vidas aŭ spertas tiun internon kiel nian eksteran mondon. Ni konas tiun eksteran mondon kiel teron kaj ĉielon, kiel kontinentojn kaj marojn, kiel aeron kaj akvon, kiel ŝtormon kaj senventon, kiel malvarmon kaj varmon, ja mallonge dirite, kiel ĉiujn naturfortojn kune. Tiu organismo estas do la terglobo. Homoj, bestoj, plantoj kaj aliaj vivoformoj en ĝia regiono estas ĝiaj mikroestuloj sammaniere, kiel niaj organoj, ĉeloj, molekuloj ktp. estas mikroestuloj en la interno de nia organismo. Tiel la terglobo estas makrokosma estulo por ni sammaniere, kiel ni estas makrokosma estulo por la mikroestuloj de nia organismo. Sed, same kiel ni ne povas percepti kaj travivi fizikan vivon alimaniere ol en tia makrokosma organismo, tiel ankaŭ nia makroestulo, la terglobo, kompreneble ne povas percepti kaj travivi alimaniere ol kiel mikroestulo en organismo, kiu estas makrokosma organismo por ĝi. Kiel ĝi havus eblon ekzisti kaj vivi, se ne ekzistus ekstera mondo ĉirkaŭ ĝi? – Manifestado de vivo ne povas okazi en nura "nenio".

**Ĉiuj vivaj estuloj estas makroestuloj, kaj ili estas ankaŭ mikroestuloj en organismoj de la makroestuloj troviĝantaj super ili**

**7.6** La ekstera mondo de la tergloba organismo estas la sunsistemo, kiu siavice troviĝas en ankoraŭ pli granda sistemo. Tiun pli grandan sistemon ni konas kiel la galaksisistemon. Ankaŭ ĝi troviĝas en pli granda sistemo, kaj tiel daŭrante supren en la senfina grando. Ĉar sunsistemoj kaj galaksisistemoj rivelas aŭ aktivigas logikajn manifestadojn, ili neeviteble estas organoj de manifestado kaj travivado por iu viva "Io" aŭ "mio" sammaniere, kiel nia fizika korpo estas organo por nia mio. Kiel alie tiuj menciitaj sistemoj povus aktivigi logikajn manifestadojn? – Sole tio, ke ili aktivigas movon, montras ilin kiel originojn de "vivesprimoj", ĉar laŭ sia baza analizo movo estas la plej altranga signo de la vivo. Tiel la tuta universo estas sistemo de vivaj estuloj, kies organismoj troviĝas ene en aliaj organismoj. Sen tiu dia sistemo ĉiaj vivtravivado kaj manifestado estus absolute maleblaj. Kiamaniere niaj fizikaj organismoj povus esti vivaj, pli facile direkteblaj aŭ gvideblaj, kaj per tio esti pli bonaj iloj por manifestado kaj travivado ol ĝuste tiel, kiel okazas helpe de miriadoj da mikroestuloj en reciproka kunlaboro kun nia mio? – Kiel tiuj mi-



© Martinus Institut 1981 Reg. 7

*Simbolo n-ro 7. La principo de vivunuoj*

kroestuloj povus havi vivspacon, universon, en kiu vivi, se ili ne povus vivi ĝuste en viva organismo? – Kaj kiel ni mem povus havi vivan fizikan organismon, se ni ne mem estus mikroestuloj en makroorganismo kun vivkondiĉoj por nia ekzisto? – La sistemo en konstruo de la viva estulo estas tio, ke samtempe ĝi reprezentas mikroestulon kaj makroestulon. El tio sekvas la principo: organismoj ene en organismoj, kio signifas ankaŭ: vivajn estulojn ene en vivaj estuloj kaj sekve ankaŭ universojn ene en universoj. Tiu sistemo sekve reprezentas la absolutan bazan principon de la vivo.

**Ni ricevos unuan videton de la eterna Dio serĉata dum ĉiuj tempoj**

**7.7** Tiu ĉiopenetra eterna vivprincipo faras la tutan universon nedisigebla unuo kombinita kaj konservata per la mioj de ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj, per iliaj kapabloj de travivado kaj kreado, kaj per iliaj organismoj aŭ korpoj. Kiel ni poste vidos, la mioj de ĉiuj vivaj estuloj kune konsistigas unu mion. Kaj same ĉiuj kapabloj de travivado kaj kreado de ĉiuj vivaj estuloj kune konsistigas ununuran grandan kapablon de travivado kaj kreado. Tiel ankaŭ la organismoj de ĉiuj vivaj estuloj konsistigas kunlaborantajn organojn aŭ korpojn en la sama granda unuo, kiu estas la universo. Sekve de tio montriĝas, ke tiu universo reprezentas unu grandan aŭ ĉioampleksan vivan estulon. Tiu gigantestulo, kiu do havas la tutan universon kiel organismon aŭ korpon, povas esti nur tiu eterna Dio, kiun la homoj serĉis dum ĉiuj tempoj kaj adoris en pli aŭ malpli perfektaj manieroj. Kaj sekve la eterna vero: En li ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas (Agoj 17.28), ĉi tie montriĝas realo.

**Klarigo pri simbolo n-ro 7**
**La simbolo montras vivan estulon.**

**7.8** La triangulo kaj la blanka figuro en la mezo simbolas la mion kaj ĝian

superkonscion, dum la ĉirkaŭa figuro simbolas ĝian fizikan organismon aŭ korpon.

En tiu korpo la simbolo estas ripete desegnita en pli kaj pli malgrandaj formatoj unu ene en alia. Tio simbolas, ke same kiel tiuj figuroj estas desegnitaj en aliaj figuroj, tiel same ankaŭ la organismoj de la vivaj estuloj estas enkonstruitaj en organismoj de aliaj vivaj estuloj. Per tio ekzistas la vivkondiĉa makro- kaj mikroestula stato, kaj ĝi garantias vivspacon kaj eblojn de kreado kaj travivado por la samaj vivaj estuloj.

Nia fizika organismo formas universon aŭ vivspacon por niaj organoj, kaj tiuj formas universon aŭ vivspacon por ankoraŭ pli malgrandaj mikroestuloj, kaj tiel daŭrante malsupren en la senfina malgrando. Sammaniere ankaŭ ni estas per nia fizika korpo mikroestulo en organismo pli granda, kaj en ĉi tiu kazo tio signifas: en la organismo de la terglobo, kiu estas organo aŭ mikroorganismo en la strukturo aŭ organismo de la sunsistemo. Kaj tiu estas mikroorganismo en la galaksisistemo, kiu mem estas mikroorganismo en sistemo aŭ organismo ankoraŭ pli granda, kaj tiel daŭrante supren en la senfina grando.

Tiel la universo estas senfina unuo konsistanta el nedisigeble kunligitaj vivaj estuloj ene en vivaj estuloj. Per tio la universo aperas kiel kulmina kaj ĉioampleksa oceano da vivo, konscio, travivado kaj kreado. Tio, ke tiu gigantokonscio estas viva estulo ekzistanta en si mem, montriĝas fakto per tio, ke neniel la konscio, travivado kaj kreado de ia ajn viva estulo povas ekzisti alimaniere ol en sia absolute nedisigebla ligo kaj kunlaboro kun la menciita gigantokonscio. Sed io, kio estas nedisigeble kunligita, povas ekzisti nur kiel unuo. Sed unuo de kunlaborantaj organoj aŭ korpoj direktata de la dia "Io", kiu aperas kiel la mio en la vivaj estuloj, povas ekzisti nur kiel viva estulo. La organismo de tiu viva estulo sekve konsistas el la organismoj de ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj kune, kio estas la tuta materia universo. Sammaniere ĝiaj mio kaj konscio konsistas el la mioj kaj konscioj de ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj. Tiel ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj konsistigas unu ĉioampleksan vivan estulon, kaj tion montras tio, ke ĉia ajn viva estulo povas ekzisti ĝuste nur per siaj nedisigeblaj ligiteco kaj kunlaboro kun la viva origino de tiu universo. Ĉi tie ni havis unuan videton de la ekzisto de eterna Dio, kun kiu nia mio, nia konscio, nia organismo kaj per tio ankaŭ niaj manifestado, travivado kaj sorto estas nedisigeble kunligitaj.

INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.





# Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

## Pri la kosmologio de Martinus

- Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
- Ĝi povas motivigi optimisman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpatiaj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.
- Laŭ la analizoj en *La Tria Testamento* "ĉio estas tre bona" el eterna perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
- La kosmologio igas "alturni ankaŭ la alian vangon" kaj "ami sian proksimulon kiel sin mem" scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
- Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.




## Eo-semajnoj en Martinus-Centro en 2019

Inter la 27-a de julio kaj 10-a de aŭgusto 2019 la Esperanto-semajnoj en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Estos prelegoj, studrondoj, konversaciaj rondoj, kaj en la vespero estos distra programo, teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Pli da informoj ĉe esperanto@martinus.dk

## Kiel trovi Martinus-Centron en Klint

De Kopenhaga Centra Stacio (Københavns Hovedbanegård) unue per trajno al Holbæk. Tie necesas ŝanĝi trajnon al Nykøbing Sjælland. De tie al Martinus-Centro per taksio. La vojaĝo de Kopenhago al la urbeto Klint daŭras ĉirkaŭ tri horojn.

Por aliĝi, bonvolu skribi al Martinus-Instituto aŭ esperanto@martinus.dk.

Martinus-Centro